# Fina raporto de la Elekta Komisiono

Elekto de estraro por la mandato 2023-2024

La raporton pretigis la Elekta Komisiono en jena konsisto:

Arya Bhaskara Ferduzi
Rogier Huurman
Tomáš Stano
Łukasz Żebrowski

Bekasi, Nimego, Prago, Varsovio
la 5-an de julio 2023

tejo

# Enhavtabelo


**Enhavtabelo** **1**

**I. Enkonduko** **3**

**II. Kandidatoj** **4**

Kandidato por la posteno de Prezidanto 4

Tyron Surmon 4

Kandidato por la posteno de Kasisto 4

Patricio Agustín Iglesias 4

Kandidato por la posteno de Ĝenerala Sekretario 4

Michal Matúšov (KuboF) 4

Kandidatoj por la posteno de Vicprezidanto 5

Snehaja Venkatesh (Snehaĝa) 5

Patricio Agustín Iglesias 5

Kandidatoj por senofica estraraneco 5

Abhinav Varma (Abhi) 5

Patricio Agustín Iglesias, Snehaja Venkatesh (Snehaĝa) 5

**III. Konsisto de la estraro** **6**

Nombro de estraranoj 6

Nombro de vicprezidantoj 6

**IV. Propono pri estrara teamo** **7**

**V. Resumo kaj fina konkludo** **9**

# I. Enkonduko

Estimataj komitatanoj,

Ni prezentas al vi la finan raporton pri nia laboro rilate al la estrarelekto por la oficperiodo 2023-2024. La proceduro okazas surbaze de la Reglamento pri elekto de estraranoj laŭ kiu la Elekta Komisiono serĉas kandidatojn por la Estraro, akceptas kandidatiĝojn, sekve esploras, ĉu kandidato estas taŭga por posteno en la estraro kaj rekomendas tiun aŭ eventuale rekomendas ekster-estraran postenon.

La Elekta Komisiono serĉis kandidatojn al la estraro pere de malferma alvoko kaj ankaŭ persone kontaktante diversajn aktivulojn, kiujn konis membroj de la komisiono mem aŭ kiuj estis rekomenditaj de aliaj homoj. Sume ni interparolis kun pli ol trideko da TEJO-aktivuloj. El tio rezultis 6 kandidatiĝoj de personoj el 4 kontinentoj. Du el la kandidatoj estas virinoj, 4 estas viroj. Ĉiuj kandidatiĝoj estas validaj laŭ nia reglamento.

En la dua parto de ĉi tiu dokumento vi trovos skize resumitajn niajn rimarkojn pri la kandidatoj. Tiuj rimarkoj estas verkitaj laŭeble koncize kaj ne enhavas bazajn informojn pri la kandidatoj. Tiujn vi trovos en iliaj kandidatiĝaj dokumentoj - vivresumoj kaj motivigaj leteroj. Tial, por vere konsciiĝi pri la kandidatoj nepras konatiĝi kun ambaŭ - ĉi tiu raporto kaj dokumentoj liveritaj de la kandidatoj, kiuj estas en aldono al ĉi tiu raporto. Ĉiuj kandidatoj kandidatiĝas por unujara mandato.

En la tria parto vi trovos nian rekomendon pri grandeco de la estrara teamo kaj ankaŭ pri nombro de vicprezidantoj.

En la kvara parto ni prezentas al vi proponojn pri konsisto de estrara teamo kun sugesto pri eventuala distribuo de estraraj fakoj.

Je la fino ni prezentas resumon kaj konkludon.

# II. Kandidatoj

## Kandidato por la posteno de Prezidanto

### Tyron Surmon

Tyron estas la sola kandidato por iĝi nova prezidanto de TEJO. Li estas nuna vicprezidanto kaj plenumas tiun rolon kontentige. Tyron volas daŭrigi laboron por la organizo, fintrakti AKSO-n kaj realigi novajn ambiciojn kiel nova retejo kaj plibonigita informado.
Ni taksas, ke Tyron havas sufiĉan sperton por la posteno, kaj ke li povas bone prioritatigi tiujn aferojn, kiuj pli gravas kaj urĝas, kio estas utila kapablo en malgranda estrara teamo.

## Kandidato por la posteno de Kasisto

### Patricio Agustín Iglesias

Patricio estas la sola kandidato por iĝi kasisto. Li celas starigi fortan financan agadon kun la celo diversigi la rimedojn de TEJO, inter alie per eventoj, donackampanjoj kaj patronvarbado, kaj konstrui proksiman rilaton kun la kasistoj de sekcioj kaj kunlabori kun aliaj organizoj.. Li ankaŭ volas plibonigi la kunlaboron inter diversaj komisionoj kaj aktivuloj de TEJO (do la fako Talento), kaj krome labori pri starigo de Junaj Amikoj kaj adoleska agado.
Ni ne dubas, ke Patricio havas sufiĉan motiviĝon, sed li ja havas multajn ambiciojn samtempe. Esperinde en bone organizita teamo li povos direktigi sian energion celite al plej indaj kaj fruktodonaj celoj.

## Kandidato por la posteno de Ĝenerala Sekretario

### Michal Matúšov (KuboF)

KuboF, kvankam li antaŭe neniam estis estrarano de TEJO, havas tre riĉan sperton en la junulara movado, kiun li povus bone uzi por subteni aktivulojn. Li havas ankaŭ bonan konon de TEJO-strukturo kaj asocioj, ĉar li kunfondis novan fakan sekcion, kaj prezidis landan sekcion. KuboF origine kandidatiĝis por esti vicprezidanto aŭ senofica estrarano, sed laŭ instigo de la Elekta Komisiono li decidis kandidatiĝi por tiu ĉi posteno. KuboF krome volas aktivi pri Aktivula Trejnado, Talento, Projektoj kaj Volontuloj.
Ni taksas KuboF kiel tre taŭgan kandidaton por la posteno, kaj esperas ke volontuloj kaj oficistoj povos sufiĉe subteni lin pri la sekretariaj taskoj.

## Kandidatoj por la posteno de Vicprezidanto

### Snehaja Venkatesh (Snehaĝa)

Snehaĝa aktiviĝis en TEJO dum la reta IJK 2020, kaj poste restis aktiva pri multaj retaj aktivaĵoj, ĉefe Retoso kaj la scienca komisiono, kaj estas multjara komitatano. Ŝi volas okupiĝi pri la fakoj Scienco, Kulturo, Informado, Adoleska agado kaj Universitata agado. Ŝi origine kandidatiĝis nur por esti senofica estrarano, sed konsiderante ŝian jaman sperton en Esperantujo la Elekta Komisiono konvinkis ŝin kandidatiĝi kiel vicprezidanto.
Ni taksas, ke Snehaĝa pretas por esti vicprezidanto, kaj kontribuos valoran spertojn kaj kapablojn al la teamo.

### Patricio Agustín Iglesias

Jam antaŭe priparolita.

## Kandidatoj por senofica estraraneco

### Abhinav Varma (Abhi)

Abhinav partoprenis multajn retajn eventojn, kaj havas asocian sperton ekster TEJO. Li montriĝas entuziasmon kaj volas okupiĝi pri Eksteraj rilatoj, Projektoj, Edukado, Scienco, Kulturo, kaj Universitata agado.
Ni taksas, ke Abhi certe pozitive kontribuos al la estrara teamo per sia sperto kaj sia entuziasmo.

### Ada Florence Iracadukunda

Ada havas sperton kiel vickasisto de Asocio Nacia de Esperanto en Burundo, kaj aktivas en nacia, sed ne internacia nivelo. Ŝi ne menciis specifan agadkampon en sia kandidatiĝo. La Elekta Komisiono rimarkas pri Ada, ke ŝi ankoraŭ ne bone konas la strukturon de TEJO, kio povas malhelpi esti efika en ĝia estraro. Anstataŭ estraraniĝo ankaŭ eblus unuavica aktiviĝo en la Komitato kaj komisionoj.

### Patricio Agustín Iglesias, Snehaja Venkatesh (Snehaĝa)

Jam antaŭe priparolitaj.

# III. Konsisto de la estraro

## Nombro de estraranoj

Pro tio, ke kandidatiĝis nur ses homoj, el kiuj kvin ni taksas plene taŭgaj, kaj unu konsiderinda, ni rekomendas kvinkapan, seskapan aŭ sepkapan teamon. En la tria okazo certe estos vaka loko, kio devigas tuj serĉi plian estraranon.

## Nombro de vicprezidantoj

La Statuto de TEJO permesas havi de unu ĝis tri vicprezidantojn. En kvinkapa aŭ seskapa teamo, laŭ ni, plej sencas havi unu vicprezidanton.

# IV. Propono pri estrara teamo

Pro la malgranda nombro de kandidatoj ne restas multe da elekto por komitatanoj; por ĉiu ofico ni rekomendas ekzakte unu personon. Krome la divido de fakoj kaj respondecoj inter estraranoj estas elekto por la estrara teamo mem, ne por la Komitato. Ni tamen listigas al vi en tabelo, kiel povas aspekti la rekomendata teamo en kvinkapa, seskapa aŭ sepkapa estraro, kaj kiel verŝajne aspektos la divido de fakoj kaj respondecoj.

| Pos. | Nomo | Propono pri estraraj fakoj |
|---|---|---|
| P | Tyron | |
| K | Patricio | Talento, Landa kaj faka agado, Junaj Amikoj |
| ĜS | KuboF | Aktivula trejnado, Transnaciaj projektoj, Volontuloj |
| VP | Snehaĝa | Retaj eventoj, Informado |
| E | Abhi | Eksteraj rilatoj, Edukado, Scienco, Kulturo |

| Pos. | Nomo | Propono pri estraraj fakoj |
|---|---|---|
| P | Tyron | |
| K | Patricio | Talento, Landa kaj faka agado, Junaj Amikoj |
| ĜS | KuboF | Aktivula trejnado, Transnaciaj projektoj, Volontuloj |
| VP | Snehaĝa | Retaj eventoj, Informado |
| E | Abhi | Eksteraj rilatoj, Edukado, Scienco, Kulturo |
| E | Ada | Egaleco |

| Pos. | Nomo | Propono pri estraraj fakoj |
|---|---|---|
| P | Tyron | |
| K | Patricio | Talento, Landa kaj faka agado, Junaj Amikoj |
| ĜS | KuboF | Aktivula trejnado, Transnaciaj projektoj, Volontuloj |
| VP | Snehaĝa | Retaj eventoj, Informado |
| E | Abhi | Eksteraj rilatoj, Edukado, Scienco, Kulturo |

| | | |
|---|---|---|
| E | Ada | Egaleco |
| *E* | *(ev. vaka)* | |

Tyron preferas ne tuj alpreni specifajn fakojn, kaj koncentriĝi pri gvidado de la estraro. Ne menciitaj estas la fako Kongresoj kaj interesgrupoj, pri kiuj la novelektotaj estraranoj mem decidu.

# V. Resumo kaj fina konkludo

Pasis la krizo de la kronviruso, kaj pasis la krizo pri administra subvencio, tamen ni perceptas, ke nun senteblas krizo pri emo aktivi en TEJO. Ni, faris ĉion, kion ni povis, por liveri al vi taŭgan estraron, eĉ se eble kun laŭstatute minimuma grandeco aŭ eventuale vaka sepa loko. Ni rimarkas, ke tute ne mankas aktivuloj en TEJO-medio. Ni interparolis kun pluraj homoj, kiujn ni taksis vere kompetentaj kaj taŭgaj por eniri la estraron. Bedaŭrinde, multaj el ili, pro diversaj kialoj, rifuzis tiun eblon - almenaŭ ĉi-jare.

Ni esperas, ke kun subteno de ne nur jam multaj oficistoj kaj volontuloj, sed ankaŭ kun helpo de la Komitato, la elektota estraro sukcesos vivteni la asocion kreante sufiĉajn sukcesojn kaj taŭgan laboretoson por inspiri aktivulojn engaĝiĝi kaj estonte kandidatiĝi.

Sukcesan voĉdonon al la komitato, kaj sukcesan kunlaboradon al ĉiuj aktivuloj, ĉu en la estraro aŭ ekster ĝi.

La Elekta Komisiono:
Arya Bhaskara Ferduzi, Rogier Huurman, Tomáš Stano, Łukasz Żebrowski

# Aldono:
# dokumentoj liveritaj de la kandidatoj

Vivresumoj kaj motivigaj leteroj